

sub la suda kruco ★
junio 2015

ESPERANTO



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 23 [2] numero 119 junio 2015

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
Redaktoroj: David Ryan, Joanne Johns
Kontaktadreso | esk2@esperanto.org.au

AEA - ESK
G.P.O. Box 2122
Melbourne, Victoria 3001
Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto sub la Suda Krucio estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEa | www.esperanto.org.nz – exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk2@esperanto.org.au

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15-a de aŭgusto 2015

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

**Por la opinioj aperantaj
en ĉi eldonajo respondecas la aŭtoroj.
Ili ne necese spegulas la opiniojn
aŭ de AEA aŭ de NZEA.**

Copyright © 2015 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 1038-9380.

SUR LA KOVRILO: Luis von Ahn, kreinto de Duolingo



5. Kio estas Duolingo?



9. Ankaŭ tia la vivo povas esti



15. La misia vojaĝo en Koreio



19. Ekologio de Melburno



23. Kvin demandoj



25. Ĉu la vivo estus pli bona se oni ne devus manĝi?



26. Esperanto – oficiala lingvo en Aŭstralio!



27. Akvaj rajtoj



30. Tagiĝo plue brilos

junio, du mil dekkvin

Antaŭparolo

DAVID RYAN (WELLINGTON)

Mi verkas ĉi tiun antaŭparolon nur kelkajn tagojn post la ANZAKa semajnfino. Dum multaj tagoj niaj du landoj kune festis specialan, historian tagon.

Certe, la morto de milionoj da viroj kaj virinoj, plejmulte junaj, el niaj du landoj estas ege bedaŭrinda kaj tragika afero, kaj mi estas certa ke kelkaj el niaj legantoj forte kontraŭstaras nian partoprenadon en militoj. Mi ne volas paroli detale pri tiu temo – mi nur volas menci tiu necesas memori tiujn kiuj jam donis sian vivon por protekti la liberecon de ontaj generacioj.

ANZAKa Tago memorigas nin ke ni estas amikoj, najbaroj, preskaŭ kuzoj, kiuj havas similajn historian kaj kulturon kaj ... preskaŭ

saman lingvon. En Nov-Zelando ni aŭskultas muzikon el Aŭstralio, ni ferias en viaj marbordoj, kaj miloj el ni flugas eksterlanden en aviadiloj de Qantas dum, en Aŭstralio, vi trinkas nian vinon, vi venas ĉi tien por skii en niaj montaroj, vi rigardas filmojn kun belaj vidoj de nia pejzaĝo, kaj konfesu ... vi admiras nin pro nia mondĉampiona rugbea teamo.

Eble en la estonteco niaj landoj unuiĝos. Finfine, Nov-Zelando havos oficialan okcidentan insulon. Intertempe, dum la ANZAK-a semajnfino, mi fieris pro mia lando kaj ankaŭ pro la via. Plej verŝajne ne estas en nia mondo aliaj du najbaraj landoj kie ekzistas tiel forta kamaradeco.



Gesoldatoj el Nov-Zelando kaj Aŭstralio antaŭ la nacia milita-memoraĵo en Wellington

Kio estas Duolingo?

NICOLE ELSE (SIDNEJO)



duolingo

Kio estas Duolingo? Ĝi estas senpaga retejo por lerni lingvojn. Ĝi eĉ ne havas ĝenajn reklamojn. Duolingo estis kreita en 2011 kaj oficiale malfermita al la publiko en 2012. En januaro 2014 jam estis 25 milionoj da uzantoj. En majo 2015 ĝi havis 10 kursojn por anglalingvanoj: kurson por la franca lingvo, la hispana, la nederlanda, la itala, la germana, ktp, plurajn kursojn de la angla lingvo por ne-anglalingvanoj kaj ankaŭ kurson de la itala lingvo por franclingvanoj ekzemple.

Kiu kreis Duolingo? Ĝi estas kreita de Luis von Ahn. Li naskiĝis en 1979 en Gvatemalo kaj loĝas nun en Usono. Li kreis la kompanion reCAPTCHA kiun li vendis al Google en 2009. Kio estas reCAPTCHA? Do, unue mi devas klarigi kio estas CAPTCHA. Tiu estas akronimo por “Completely Automated Public Turing test to tell

Computers and Humans Apart”. Ĝi estas simple vorto kiu estas malfacile legebla de komputilo sed relative facile legebla de vera persono. Do



Ekzemplo de reCAPTCHA



Luis von Ahn, kreinto de Duolingo

tio estas uzata por testi ĉu la leganto estas vera persono.

En 2007 von Ahn kreis reCAPTCHA, kiu estas nova formo de CAPTCHA. Tiu nova formo helpas ciferigi tekstojn. Komputiloj ankoraŭ ne kapablas perfekte ciferigi tekstojn

speciale se la libroj estas iom malnovaj kaj la paĝoj estas iomete difektitaj. La uzanto ricevas du vortojn. Unu el la vortoj estas konata de la komputilo kaj, tial, la komputilo povas kontroli ĉu la uzanto bone tajpis ĝin, sed la alia vorto estas vorto kiu venas de malnova libro. Se la uzanto bone entajpas unu vorton, la komputilo deduktas ke verŝajne li ankaŭ bone entajpas la alian. Tamen, la vorto estas donita al pluraj personoj kaj tial se pluraj personoj entajpas la samon oni povas fidi ke ili ĝuste tajpis. La rezulto estas uzata por ciferigi malnovajn librojn. ReCAPTCHA estas uzata en pli ol 100,000 retejoj kaj helpas ciferigi pli ol 40 milionojn da vortoj tage.

Post tiu iom longa klarigo ni revenu al Duolingo. Luis von Ahn ŝatus ke grandega kvanto da retejoj estu legeblaj en pluraj lingvoj. Li konscias ke maŝintradukoj ne estas sufiĉe altkvalitaj. Kiel instigi personojn traduki retejojn senpage? Multaj personoj deziras lerni fremdajn lingvojn, do ni petu ilin traduki verajn frazojn el la reto kiel ekzercio. Komencantoj ricevos facilajn frazojn kaj progresintoj malpli facilajn. Pluraj personoj ricevos la samajn frazojn.



Luis von Ahn opinias ke fakte tiuj tradukoj de lernantoj estos sufiĉe pli bonkvalitaj ol tiuj faritaj per maŝino. Tio estas la ideo de tiu projekto.

Iom post iom Luis von Ahn deziras aldoni pli kaj pli da lingvoj. Li ricevis multegajn mesaĝojn petante kurson pri Esperanto. Li iom surpiziĝis pro tio, sed akceptis ke Esperanto estu aldonita. La kursoj estas faritaj de volontuloj. Unue estis nur 2 volontuloj, sed nun 5 volontuloj laboras pri la kurso de Esperanto. Mi pensas ke ili komencis meze de 2014 kaj nun la kurso estas preskaŭ preta. Tamen ĉiuj frazoj devas esti laŭtlegataj de iu kaj tiu tasko ankoraŭ ne estas



finita.

Sur la retejo de Duolingo oni povas indiki ke oni deziras esti informata kiam la kurso finpretos. Jam pli ol 25 000 personoj volas esti informataj. Se ankaŭ vi deziras scii kiam eblos komenci lerni Esperanton, iru al: www.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online.

Kiuj estas la volontuloj? Unu estas Chuck Smith, usonano kiu loĝas en Germanio. Alia estas Ruth Keess-Cohen, usonanino kiu aŭdis pri Esperanto dank' al Duolingo, du francoj, Paul el Grenoblo kaj Anja Eisemann, kaj Detlef Karthaus denaske germanlingvano kiu loĝas en Kanado.

Kiel mi jam diris, la kurso jam ekzistas por pluraj lingvoj. Tial, ĉu la Esperanto-kurso estos simple traduko de la aliaj kursoj? Ne, la kurso estas adaptita al Esperanto kaj, ekzemple, estos parto pri la akuzativo, parto pri afiksoj, ktp.

Kiel funkcias la kurso? La kurso ja havos sonon por ke vi povu aŭdi ĉiujn frazojn. La ekzercoj iom varias, foje estas bildoj kaj vi devas elekti la ĝustan bildon inter tri, sed sufiĉe ofte vi devas entajpi la tradukon de mallongaj frazoj. Tial, ne temas nur pri klakado, vi devas ankaŭ tajpi sufiĉe multe. Eble tio ja povus malkuraĝigi kelkajn personojn. Vi povas aŭskulti frazon malpli rapide se vi deziras. Se vi havas problemon aŭ ne komprenas ion, vi povas skribi demandon kaj kutime alia uzanto tre rapide respondas. Ankaŭ foje estas interese legi pri la problemoj de aliaj personoj.

La ĉefa allogaĵo estas ke la kurso estas iom kiel ludo.* Vi ricevas poentojn, kaj tubo pleniĝas iom pli kaj pli por ĉiu ĝusta respondo, kaj ĝi malpleniĝas pro malĝusta respondo. Vi ricevas orpecojn kiam vi finas unu parton, vi ricevas pli da pecoj se vi ludas ĉiun tagon. Per la orpecoj vi

La esperantaj volontuloj, kiuj laboras pri la kurso de Esperanto.

 RuthKC I was lucky to discover Esperanto while reading a discussion on Duolingo; now very happy to be a member of the Esperanto course team. WASHINGTON DC USA Contributed 29%	 amuzulo Duolingo Esperanto course moderator, Founder/CEO of Ludisto, Transparent Language Esperanto blogger, Computerspielemuseum tour guide BERLIN, GERMANY Contributed 28%	 Swdreamk33 I'm a contributor/moderator for the Esperanto for English speakers course. GRENOBLE, FRANCE Contributed 25%	 flyver Of all the languages I have learnt, Esperanto has been the most helpful in connecting me to people. PARIS, FRANCE Contributed 11%
--	---	---	--

povas aĉeti kvizojn aŭ la eblecon ne perdi poentojn eĉ se dum unu tago vi ne ludas ktp. En tiu rilato mi pensas ke la kurso estas pli alloga ol lernu.net. Tamen laŭ mi la ĉefa avantaĝo estas ke ĝi estas sur retejo kiu certe estos vaste konata de lernemuloj de diversaj lingvoj kaj tial multaj personoj tiel rimarkos la ekziston de Esperanto.

Mi legis la ciferon ke fine de 2015 proksimume 100,000 personoj lernos Esperanton per Duolingo. Unue la kurso ekzistos nur baze de la angla lingvo, sed supozeble en estonteco ja povos esti ankaŭ Esperanto-kurso por franclingvanoj, hispanlingvanoj, ktp.

Laŭ mi la kurso en Duolingo estos eble la plej bona atingo por Esperanto en 2015. Ege multaj personoj kontrolos kiuj lingvoj estas lerneblaj per Duolingo kaj ili vidos Esperanton en la listo kaj multaj

certe iom scivolemos kaj almenaŭ komencos lerni Esperanton.

Vidu en www.youtube.com/watch?v=cQL6jUjFjp4 pri Catcha kaj Duolingo.

www.youtube.com/watch?v=e7aTabdZr5Q
Plej multaj personoj petas aldonon de Esperanto-kurso

(Rimarko de la redaktoro: en la retpaĝo de Duolingo aperas tute nova anglalingva vorto: "gamification". En Esperanto tia vorto - ludigo- estas facile komprenebla kaj akceptebla. Tamen, en la angla mi trovas tiun vorton iom stranga.)

Nota: La kurso de Esperanto en Duolingo nun pretas kaj uzeblas. Jam preskaŭ 3 000 lernantoj en nur kelkaj horoj!

Kelkaj el la venontaj kursoj en Duolingo, inklusive de Esperanto.



Ankaŭ tia la vivo povas esti

BOB FELBY (ADELAJDO)

Iam estis viro, sed vi ankoraŭ ne scias kiu estis tiu viro, aŭ ĉu? Tiu viro loĝis en unu el la multaj landoj de la mondo. Estas bedaŭrinde ke estas tiom da malsamaj landoj en la mondo! Tial Zamenhof decidis ion fari por plibonigi tiun ĥaosan situacion. Li inventis Esperanton por ke ĉiuj nacioj iam estontece unuiĝu kaj iĝu nur unu lando. Tre granda lando sendube, sed nur unu !

Nu, tio ankoraŭ ne okazis kaj niaj tro multaj registaroj ĝojas pro tio. Kiam estos nur unu lando, tiam ili ja ne plu povos ĝui sian ŝatokupon militi kontraŭ alia lando. Sed mi certas ke ili tiam, se ne jam antaŭe, eble eĉ nun, cerbumas pri okazigo de milito kontraŭ alia(j) planedo(j). Mi vivis jam sufiĉe longe por bone kompreni kiel funkcias la t.n. "cerbo" de politikisto!

Nu, por ne forgesi pri tiu viro. Li ne ĉiam estis viro. Li komencis sian vivon kiel suĉinfano. Sed tio ne daŭris longe. Subite la suĉinfano decidis ne plu suĉi, kaj li iĝis infano. Li iĝis infano kaj komencis pensi memstare.

Li vivis preskaŭ feliĉan infanan vivon, kvankam ne ĉiam. Sed subite la sorto sin turnis kontraŭ li, kaj oni sendis lin al la lernejo por ke ĉesu lia feliĉo. Aŭ almenaŭ tion sentis la eta knabo, kiu fakte ne plu estis eta, ĉar

li estis preskaŭ jam 7-jara.

Li devis toleri sep terurajn jarojn kiel lernejano. Tio ne plaĉis al li, sed tio plaĉis ankaŭ ne al ĉiuj liaj kamaradoj, aŭ kunlernejoj, kiuj estis devigataj suferi kune kun li. Sed la terura sorto subite mildigis iliajn suferojn. La sorto fermis la lernejojn igante ilin gastejoj de tiel nomataj fremdaj virinoj kaj infanoj. Virinoj kaj infanoj de Germanujo, kiuj bezonis loĝi ie. Tio estis espereble ĝojego por ili, kaj certe por la lernejoj grandega ĝojo kaj feliĉo. Ili iĝis liberuloj kaj povis ekde tiam ĝui la vivon.

Preskaŭ tuj poste nia nun granda knabo iĝis laboristo, ĉar li estis jam 13-jara. Lia ĝisnuna preskaŭa malfeliĉo subite ĉesis. Proksimume 7 jarojn la sorto devigis lin esti malfeliĉa, eĉ malfeliĉega. Sed li intertempe provis instrui al si muzikon kaj Esperanton. Li ankoraŭ ne finlernis; tion mi bone scias. Sed muzikante kaj Esperantumante li estis vera feliĉulo. Do muziko kaj Esperanto ne estas la plej malbonaj ŝatokupoj en la mondo. Mi supozas, sed mi ne parolas pri politikistoj kiuj igante infanojn sklavlaboristoj estas multe pli malbonaj, por diri tion milde.

Do, kiam nia heroo, mi diras "heroo", ĉar mi eĉ tre bone konas



lin, iĝis 20-jara, la sangosoifanta registaro decidis ke nia esperantisto devas iĝi soldato kaj lerni detrui urbegojn, malsanulejojn, lernejojn, ŝipojn, ktp. Sed ne nur tion. Li devas, ĉar tio evidente estas unu el la plej gravaj aferoj laŭ la registaranoj, lerni mortigi ne nur aliajn soldatojn, sed ankaŭ gemaljunulojn, ordinarajn virojn kaj virinojn kaj kompreneble, ni ne forgesu, la infanojn. Ĉiuj kiuj ne parolas la lingvon de nia registaro devas esti mortigitaj kaj iliaj posedaĵoj devas esti ruinigitaj.

Do, tiam nia heroo pruvis ke li estas vera heroo. Li diris al la reprezentantoj de la firegistarato kion li pensas pri ili, kaj kiel premion li ricevis du jarojn en punlaborejo. Se li estus elektinta iĝi profesia mortiganto, li estus ricevinta nur 18 monatojn lernante kaj eble praktikante tion.

Sed nia heroo ne estis stulta. Li decidis ke, se li devas morti, li mortos kun kiom eble plej pura konscienco.

Do li iris en la punlaborejon. Li baldaŭ trovis tie la veran feliĉon. Li pasigis sian tempon tie kune kun aliaj veraj samideanoj. Ili ĉiuj eĉ tre bone komprenis ke la unua io, kio gravas, estas la bonfarto kaj ĝojo de la proksimuloj. Kaj tie estis 85 proksimuloj. Ili reprezentis plurajn diversajn opiniojn, sed fakte nur unu estis kapitalisto. La plej multaj, fakte 84, estis ordinaraj proletoj, kiuj ĉiuj komprenis ke militoj estas krimo kontraŭ la homaro. La ĵurnalistoj raportis erare en la ĵurnaloj pri ili, ke ili estas malkuraĝuloj kaj perfiduloj, dum la vero estas ke ili estis la plej kuraĝaj el ĉiuj, ĉar ili kuraĝis kontraŭstari la ĝeneralan opinion de la publiko. Cetere, eble la ĵurnalistoj ne estis tiom stultaj, kiom ili ŝajnis, ĉar iliaj eraraj raportoj ja helpis vendi la ĵurnalojn. Sed, tamen, la vivo antaŭ longe instruis al la militrifuzantoj ke ĉiam estas pli bone ne mensogi! Nia heroo eĉ instruis Esperanton tie, kio multe helpis al la plifeliĉigo de ĉiuj aliaj!

Nia populara heroo finis sian "kontraŭmilitoservon" sufiĉe baldaŭ. Post nur 22 monatoj li liberiĝis de sia ĝistiam feliĉo. Tiam li iris al alia lando, en kiu oni parolis tute alian lingvon kun tre malfacila elparolo. Sed estante feliĉulo kaj lernema, li tre baldaŭ lernis ankaŭ tiun strangajon. Li sekvis sian naturon kaj enamiĝis al juna belulino kiu decidis kuniri

hejmen kun li al lia tiel nomata hejmlando, en kies ĉefurbo li loĝis. Tie ili loĝis kelkajn monatojn kaj la feliĉo de nia heroo iom post iom paliĝis. Li ne plu povis ĝui la belan naturon en la arbarego kun la multaj majestaj bestoj, en kiu la punlaborejo situas.

Do, sekvante sian strangan naturon, li kun sia belulino reiris al ŝia belega lando, kie ĉiuj parolas tre amuzan lingvon, precipe en la ĉefurbo. Sed li ne laboris en la ĉefurbo. Li laboris en malpli grava urbo, sed pli proksima al la naturo. Naskiĝis al ili la unua suĉinfano. La feliĉo de ili ambaŭ estis eĉ tre granda, sed tiu feliĉo daŭris bedaŭrinde nur du aŭ tri tagojn. Tiam la kompatinda etulo decidis eliri el sia nova materia korpo kaj reiri al tie, de kie li venis.

Sed daŭris nur unu jaron, aŭ pli precize, du tagojn malpli ol unu jaron. Tiam li revenis, en tute alia korpeto multe pli sana. Tiun fojon li estis same kiel siaj gepatroj ĝoja kaj feliĉa. Lia patro estis feliĉa malgraŭ la fakto ke li ja devis ĉiun tagon labori, sed li tre ĝojis pro sia suĉinfano.

Kaj jen la miraklo, ankoraŭ unu jaro pasis, plus 45 tagoj. Tiam naskiĝis alia perfekta filo. Li, malsame al sia pli aĝa frateto, decidis resti en sia materia korpeto kaj vidi kio okazos. Feliĉe, li ankoraŭ hodiaŭ estas en tiu sama korpo, kiu ne plu estas korpeto.

Sed la vivo povas ja iĝi teda se oni loĝas en la kamparo. Homo naskita en ĉefurbo de tempo al tempo bezonas senti ke li, se li deziras distriĝi, povas distriĝi. Kaj ne estas facile distriĝi en la kamparo. La viro, do, kaj la virino kaj la du filetoj forlasis la belan landon kaj reiris, la filetoj ne reiris, ili nur iris, al la gepatra lando de la viro, kiu estas ilia patro.

Tie, en tiu alia bela lando, la viro trovis bonegan laboron. Li perlaboris multe da mono kaj la du filoj subite havis ludilojn kaj aliajn aferojn necesajn al infanoj. La patrino tre ĝojis loĝi en tiu bona, eĉ bonega lando, kaj baldaŭ aldonis al la familio ion, kion ĝi ĝis tiam ne havis - etan filinon, kiu ĉe la naskiĝo estis nur suĉinfano.

Sed baldaŭ la familio deziris ŝanĝiĝon. Ili do formigris el sia bela, eĉ belega lando, al alia lando, kiu fakte estas tre grandega insulo, eĉ insulego, sur kiu oni povas senti sin kaptita, ĉar ne estas malmultekoste forlasi ĝin. Tie ili vivis multajn jarojn babilante en tri diversaj lingvoj kaj ĝojegis ĉiun tagon. Sed tiu lando estas multe pli varmega ol la lando, kiun ili forlasis. De ilia nova hejmo necesis iri 10 trajnhaltejojn al la centra stacidomo de la ĉefurbo, en kiu ili loĝis. La heroo de ĉi tiu rakonto iam rakontis al mi ke li sidis tie en la vagonaro. Ĝi konsistis el nur du vagonoj, do fakte ne estis vagonaro. Sed tamen kaj tiel plu, ĉu ne?

Nia heroo do sidis tie duone dormante kiel ĉiuj aliaj pasaĝeroj. Subite io iritis lin sub la nazo. Muŝo provis eniri en unu el liaj naztruoj nur por eliri el la alia. Tio tiklis lin iomete, fakte iomete tro. Li estis lerninta ke oni ne mortigu, kaj li intencis sekvi tiun gravan instruon. La muŝo rampis iom pli supren kaj provis eniri lian okulkavon, sed, kompreneble, ne sukcesis. Sed tio, kiel jam dirite, tre iritis la viron, kiu tamen faris nenion. Sed kiam la muŝo provis eniri en unu el liaj oreloj, li perdis la paciencon kaj metis sian fingron tuj sub la oreleon. La muŝo surrampis la fingron, kaj la viro etendis sian brakon kaj metis la muŝon sur la ekstreman parton de sia sidloko. Tiam li iomete gratis sian vizaĝon kaj estis kontenta ke la muŝo ne plu ĝenas lin.

Sed haltis la trajno. Eniris pli da pasaĝeroj pagintaj kaj kun ili eĉ pli da muŝoj ne pagintaj. Nun komencis la komedio. La viro amuzis sin rigardante la aliajn pasaĝerojn. Unue ili provis aspekti tre seriozaj, sed iom post iom ili komencis saluti la muŝojn



rampantajn sur ili. Permane ili provis forpuŝi ilin, sed tio, kompreneble, ne sukcesis. Tiam ili ekbatis sian propran vizaĝon, kaj tio igis nian heroon rideti, li provis ne ridegi! Fine ĉiu pasaĝero en la trajno rapide movis siajn manojn kaj aspektis kvazaŭ ili estus pupoj en pupteatraĵo.

Nia sentema heroo komencis filozofii. Li venis al la konkludo ke ĉiuj muŝoj estas elkarniĝintaj homoj vivintaj sur la Tero. Sed ke, ĉar ili mortis kun malbona konscienco, ili devas pagi siajn pekojn faritajn dum la surtera vivo kiel homoj, necesis ke ili mortu po unu fojon pro ĉiu peko, kiun ili faris kontraŭ siaj kunhomoj kaj aliaj bestoj.

Nu, por kiom eble plej rapide pagi siajn ŝuldojn kaj reveni al la ĉiela vivo, ili do elektis enkarniĝi kiel muŝoj, ĉar tiuj vivas nur tre mallonge, do pli rapide ili povos elpigi siajn ŝuldojn. Ili do kun ĝojo kaj espero flugas al la enkarniĝintaj homoj kaj rampas tien kaj reen sur iliaj vizaĝoj. Ili vere esperas ke la enkarniĝintaj homoj eĉ tre volonte mortigus ilin per siaj grandaj manoj. Kaj, fakte, ŝajnas ke tio veras. Nu, tio sufiĉu pri la kialo kial vivas muŝoj sur la Tero, ĉu ne?

La vivo de la familio, kiu enmigris en tiun muŝorican landon, iĝis eĉ multe pli bona, kiam la patro emeritiĝis. Tiam li kaj la patrino reiris vidi siajn malnovajn landojn kaj familion kaj



geamikaron. Sed, okazis tio, kio ja devas okazi. Ĉio bona havas finon, ĉu ne? La patrino iĝis tre malsana kaj iom post iom forvelkis unu grava organo post alia en ŝia kompatinda korpo. Post kiam forvelkis ankaŭ la renoj ŝi decidis eliri el sia eluzita materia korpo kaj, 50 tagojn post sia enmalsanulejiĝo, ŝi eniris multe pli bonan spiritan korpon. Nun ŝi loĝas en la spirita mondo rigardante la ceteran familion kaj ĝiajn du hundojn.

Sed ankaŭ tio ne daŭris tre longe. Preskaŭ tuj post la forpaso de la patrino, al la pli aĝa hundino, estis prognozata diabeto. Dum unu tuta jaro la patro diligente injektis en ŝin insulinon du fojojn ĉiutage, dum li provis haltigi siajn larmojn. Ŝajnis ke la feliĉo ĉesis.

Sed kompreneble ne. Tiu viro, nia heroo, estas vivopova. Li amuzis siajn du hundojn kaj ili ĝojis kaj amis sian patron. Sed iun belan tagon, fakte estis merkredo, la granda hundino ege malsaniĝis, vomadis, kaj rifuzis manĝi. Ĉar ŝi ne manĝis, ne eblis injekti en ŝin insulinon, kaj la hundino vomadis dum la tuta nokto, la patro purigis kaj lavis la plankon dum la tuta nokto. En la mateno la hundino ankoraŭ vomadis, la patro, tre laca, eĉ lacega, purigis kaj lavis la plankon ankoraŭ kelkajn fojojn. 10 minutojn antaŭ la 8-a horo jaŭdon la de ĉiuj amata hundino forlasis sian malsanan, materian korpon kaj iris renkonten al sia patrino en la ĉielo. Nun ili ambaŭ ludas kune tie rigardante sian surteran familion kun kompato!



La misia vojaĝo en Koreio

ILIA DEWA SUFI (INDONEZIO)

Vojaĝo al Koreio

Inter la 22a kaj la 31a de majo, mi vojaĝis en Koreio. Tiu estis mia unua vojaĝo planita lastjare. Kial Koreio? Ĉar ĉiuj aferoj rilataj al tiu lando estas tre famaj en mia lando, Indonezio: manĝaĵo, kulturo, turismo, dramo ktp. Pro tio mi pli interesiĝis pri Koreio. Alia kialo estas ke mi ŝatus viziti koreajn E-amikojn, kiujn mi ekkonis, kiam skajpe mi ĉeestis kurson de la Seula Esperanto-Kulturcentro (SEK) kaj paroligis la kursanojn en Esperanto. Kombinite de planita itinero de s-ro LEE Jungkee, Prezidanto de SEK, kaj mia propra agado, mi agrable pasigis mian tempon en la ĉefurbo Seulo kaj aliaj apudaj urboj. Mi ĝuis la 8 tagojn en Koreio kun afablaj kaj helpemaj esperantistoj.

La unua helpema samideano estis Minmin (MIN Hyeonkyeong), Ĝenerala Sekretario de la Korea Esperanto-Asocio (KEA). Matene de la 23a de majo ŝi trankvile atendis min ĉe Incheon-flughaveno kaj unuavide mi rimarkis kaj salutis ŝin pro la verda flago ĉe ŝia mano. Ŝi bonvenigis min kaj ni kune veturis al Seulo tuj post la aĉeto de trajn-bileto. Dum la veturado de ĉ. 1.5 horoj mi sentis min iom dormema pro la sendormo dum la flugo. Atinginte la urbcentron, mi

ĝojis rigardi la ĉirkaŭaĵon dirante “Mi alvenis al Seulo!”. Minmin gvidis min unue al la malnova pordego de la palaco Deoksugung, kiu staras harmonie kun modernaj konstruaĵoj. Antaŭ ĝi, mi spektis la unikan ceremonion por ŝanĝo de gardistoj. Tie mi renkontis s-inon LI Hyon-suk, Vicprezidanto de KEA, kaj kune manĝis la tradician manĝaĵon Chueotang. Ŝi akompanis min en la palaco, ĉar Minmin devis iri al KEA-oficejo. Jam estis la 1-a horo ptm. Ni devis rapide iri al la loko, kie s-ro LEE Jungkee atendas min. Per buso ni finfine ĝustatempe alvenis al tiu loko kaj kun li iris al la universitato Kyunghee en Seulo, en kiu li havas regulan E-kurson. Mi antaŭĝojis renkontiĝi kaj konatiĝi kun la studentoj kaj pro tio la laceco ĉe mi nature malaperis. Ĉirkaŭ 50 studentoj ĉeestis la kurson. Mia tasko estis paroligi ilin en Esperanto kaj doni la motivon plu lerni la lingvon al ili, kiuj eklernis ĝin antaŭ 3 monatoj. Ili kuraĝe ĵetis diversajn mallongajn demandojn pri Indonezio kaj atente aŭskultis miajn respondojn. Ankaŭ mi havis ŝancon aŭskulti iliajn respondojn al miaj demandoj. Ŝajnis ke la tempo flugas tre rapide pro la amika kaj agrabla konversacio inter mi kaj ili. Mi adiaŭis la kursanojn kun ilia granda aplaŭdo.

Mi faris la paroligan agadon ankaŭ en du aliaj universitatoj: Kyunghee-

Maldektra paĝo: Ilia kaj sia amikino el Koreio, Lumluna vestita en tradicia kostumo

Universitato en Suwon je la 27a kaj Wonkwang-Universitato en Iksan je la 29a. La kursanoj de la tri universitatoj en Seulo estis entute 130 gestudentoj.

Antaŭ ol iri al Anima (KIM Okjeong), ĉe kiu mi gastos dum la restado en Koreio, mi ĝuis vespermanĝon en la universitato kun s-ro LEE Jungkee. Trajne mi atingis la stacidomon kie Anima jam atendas min. Unuafoje mi renkontis ŝin, kun kiu mi iam interparolis skajpe kaj tuj povis amikiĝi pro ŝiaj afableco kaj helpemo.

Kun samideanoj al bela naturo

Post bona nokto-ripozo, mi havis pli da energio por akcepti mian duan tagon en Seulo kaj realigi la amuzan semajnfinojn kiun planis Anima. Kun Suno (KIM Seonwook) kaj Dumina

(MIN okkyeong) mi matene ekveturis per aŭto al la monto Ĝirisan, kiu estas fama kun ĝia bela pejzaĝo kaj freŝa aero. Tio estis sufiĉe longa vojaĝo. Ĉ. 5 horojn mi estis surstrate kaj tagmeze atingis la belan vilaon de Anima, ĉirkaŭita de la montaro. Unue mi malfermis la okulojn kaj profunde enspiris la freŝan aeron. Iom post iom la bona sento okupis la korpon kaj la menson. Hmm... tiom trankvila mi sentis min. Mi tre ĝojis pasigi la amikan tempon kun tiuj ĉarmaj samideanoj, ĝuante fragojn ĉe korto de la vilao kaj promenadon sur la monto Ĝirisan. Tiun vesperon ni volis gustumi bovaĵon kuiritan sur brulaj lignokarboj ankaŭ kun Eltena (GIM Inhye) kiu venis de la urbo Busan por ĉeesti la feston. Ni ĝuis tre bongustan manĝon kaj amuzan

Komuna foto antaŭ regula kunveno ĉe oficejo de Koreia Esperanto-Asocio





Ilia vizitis elementan lernejon kaj prezentis pri Indonezio Esperante al afablaj lernantoj

babiladon rigardante belajn steletojn sur la ĉielo. Kiel bela estis la nokto!

En dimanĉa posttagmezo, sur la revena vojo al Seulo mi vizitis malnovan tradician vilaĝon en kiu ankoraŭ oni loĝas tradicie, kaj havis tradician korean manĝon. Finfine mi iom post iom kutimiĝis al la ĉefmanĝaĵo kimĉio, kies guston antaŭe mi ne ŝatis. Poste mi adiaŭis Eltena ĉe bus-stacio kaj iris al la domo de Anima en Seulo. Pri Eltena mi havas bonan impreson pro nia preskaŭ samaĝa pensmaniero kaj ŝia bonkonduito.

En elementa kaj meza lernejoj en Seulo

Je la 28a, mi vizitis Bongwon-mezlernejon, kiun viziton Sonorilo (PARK Jongsun) kiel ĝia instruisto okazigis por siaj klasanoj. La lernantoj akceptis min per la afiŝo kiun ili mem

faris per desegnaĵo kaj informo pri Indonezio. Kun granda ĝojo pro ilia entuziasmo mi parolis pri mia lando al ili. Bedaŭrinde ili ne lernas Esperanton en regula leciono; tial, tradukisto estis bezonata. Mi ankaŭ montris tradician dancon de Indonezio kaj gvidis ilin kanti indonezian kanton. Post la duhora prelego, mi ricevis grandan aplaŭdon de ĉiuj kaj memorfoton kun ili.

Je la 30a, mi estis invitita de Brila (OH Soonmo, vicprez. de KEA) al Suseong-elementlernejo, akompanita de KIM Onnuri (Onia, Prezidanto de la Korea E-Junularo). En la lernejo mi ankaŭ spertis mirindan tempon. Mi prelegis pri historio, kulturo, kaj demografio de mia lando, por ke la gelernantoj povu havi pli da scio kaj impresoj pri Indonezio. Ĉirkaŭ 14 gelernantoj atente aŭskultis mian

mallongan prezenton, kiun Onia interpretis en la korean. En la lasta paŝo, ili ĵetis demandojn al mi kaj mi ĝoje respondis. Fine ni kune fotiĝis por memoraĵo.

Kun helpemaj samideanoj

Dum mia restado en Koreio, mi preskaŭ ne estis sola. Ĉiuj samideanoj volonte helpis kaj prizorgis mian agadon. Dank'al ili mi vere feliĉis dum la vojaĝo bone aranĝita. Mi havis ŝancon viziti SEK-n, kiu jam sukcese naskis multajn esperantistojn sub la gvido de la Prezidanto LEE Jungkee, kaj gvidate de Elstara (BAK Suhyeon, estro de Seula filio) mi vizitis la turon sur la monto Namsan, kiu staras centre de Seulo. Ekde tiu alta loko mi povis trarigardi la ĉefurbon. Vespere mi ĉeestis kunvenon de KEA kaj konatiĝis kun pli da samideanoj kaj havis amikan interparoladon.

Je la 26a, la ĉarma amikino Lumluna (JON Soyeon) akompanis min al la palaco Gyeongbokgung kaj la nacia muzeo en ĝi. En la palaco mi sentis la tradician etoson de la dinastio Joseon, en kiu la korea alfabeto Hangulo kaj ĝia skribsistemo Hunminjeongeum estis kreitaj. Post tio mi marŝis al la placo antaŭ la palaco kaj havis ŝancon surmeti korean tradician kostumon eĉ senpage. Momente mi ĝuis mian elegantan aspekton kiel koreanino. Vespere mi partoprenis en la 4a invitprelego de Rondo-Verdulo de SEK, en kiu 13 samideanoj kunsidis. La temo estis pri Indonezio kaj ties

E-movado. Fine de la prelego mi fiere ricevis la atestilon de Rondo-Verdulo, kiu estas honore donita al tiuj kiuj tralegis 'La 200 bonaj frazoj'-n.

Ankaŭ Akva kaj Pasia (HWANG Sine) helpis min, volonte gvidante min al merkato por mia aĉetado de donacoj por miaj familianoj kaj amikoj.

Adiaŭa vespero

Jam proksimiĝis la adiaŭa tempo. Por mi kunvenis ok samideanoj en restoracio apud SEK. Dum la vespermanĝo ni interparolis pri diversaj temoj. S-ro LEE Jungkee demandis al mi pri mia impresado dum la vizito. Mi diris: kvankam mi nun adiaŭas vin, tamen mi certas rerenkontiĝi kun vi, kaj preferas diri 'ĝis revido!' dezirante baldaŭan renkontiĝon.

Tiel mi tre ĝoje pasigis la belajn tagojn kaj plenumis la mision por prezenti Indonezion, sperti Esperantujon de Koreio, kaj eltrovi vojon al verdaj familianoj. Mi pensas ke la vojaĝo estis tute sukcesa pro la grandaj helpo kaj zorgo de karaj samideanoj en Koreio. Do, kun neforgeseblaj memoroj mi estas tre dankema al tiuj kiuj akceptis min samideane.

Koran dankon el Indonezio!

Ekologio de Melburno


JENNIFER BISHOP (MELBURNO)

Nomita en 1860 'Mirinda Melburno', bedaŭrinde la urbo rapide perdis la distingon pro tro rapida kreskado, sen instaligi la necesajn sociajn servojn. Eble hodiaŭ post nur 180 jaroj kiel ŝtata ĉefurbo ĝi vere meritas la honoron pro sia nova koncentriĝo pri ekologiaj necesoj, kaj por montri sian elastecon: daŭra

evoluo dum ĉi tiu jarcento kaj pluen por la popolo, daŭra subtenebleco ĉiamaniera, konservado de naturo kaj historiaĵoj.

En 1835, Generalo LaTrobe, la unua brita guberniestro, ekologie tre antaŭvidanta, kreis mapon sur kiu la komerca centro de Melburno havas rektangulan formon kaj ĉe ĉiu angulo

Mapo de Melburno en 1855



belan parkon. En 1851 la komenco de or-minado norde de Melburno allogis homojn de tra la mondo por gajni sian riĉecon, plej multaj per elfosado, sed aliaj kiel inĝenieroj, bankistoj, juristoj, vendistoj, farmistoj, preĝistoj ktp. Por energio uzatis karbo kaj ligno. Kompreneble la vendado kaj eksportado de oro tre rapide riĉigis multajn kaj necesigis la konstruadon de belaj bankoj, poŝtoŝtationoj, trezorejoj, malliberejoj, vendejoj ktp, plej multe laŭ la eŭropa stilo de tiu epoko. La riĉuloj konstruigis belajn domojn ekster la urbo. Bedaŭrinde la kompatindaj laborantoj ne povis konstruigi domon kaj vivis ĉe la or-minejo, aŭ en kabano surstrate en la mallarĝaj vojetoj malantaŭ la ĉefaj stratoj aŭ en la ĉina kvartalo. Ĉi

tiu kvartalo ankoraŭ ekzistas en Lt. Bourke St, sed nun, laŭ ĉina kulturo, en bona stato.

En 1861 Melburno iĝis la plej granda urbo de Aŭstralio, kvankam eble je tiu tempo la haveno de Geelong pli aktivis kaj valoris. Kompreneble plej urĝis transporto por profesiuloj, kaj rapide troviĝis ne nur individuaj ĉaroj tirataj per ĉevalo, sed ankaŭ tiaj busoj.

En 1880 la loĝantaro de granda Melburno atingis 500,000. Sidnejo konservis sian eminentecon sed Melburno firme estis komerca kaj kultura centro de la kolonio. Kompreneble Melburno gajnis distingon pro la valorega oro. Alvenis vizitantoj eksterlandaj kaj kelkaj eĉ komparis Melburnon al Ĉikago

La malnova trezorejo



aŭ Novjorko. Kvankam 'Mirinda Melburno' je tiu tempo impresis multajn, bedaŭrinde ĝi rapide iĝis 'Smellbourne', odoraĉa Melburno, pro la fluado de ekskremento laŭstrate en riveretojn kaj riverojn.

Komenciĝis en 1890 la dua evoluperiodo per konstruado de la ekspoziciejo, grandaj preĝejoj, stacidomo ĉe Flinders St, kaj enmigradejo. En 1892 fondatis plej urĝe la Melburna kaj Metropola Komisiono de Fabrikejoj (MMBW). Aĉetatis terenoj apud Werribee, 30km for de Melburno. En 1897 komenciĝis la konstruado de kloakaĵsistemo. Laŭ la nova plano iu konstruaĵo devas havi unu necesejon el kiu ĉiuj kloakaĵoj falas per gravito en subterajn tubojn, fluas al vapora pumpstacio kaj pluen al la kloakaĵfarmo en Werribee. Ekde 1921 pro la grandaj lagoj la tuta areo kreis azilon por birdoj kaj bestoj. Por eviti la daŭran odoraĉon de ĉevalfekaĵoj kontruatis mirinda retejo de kabloj por tramoj plej grave por laborantoj en la urbo, sed ankaŭ por profesiuloj de la nun konstruataj belaj kaj puraj antaŭurboj. Ankoraŭ elemento grava bezonanta atenton je la fino de la 19a jarcento estis enkonduko de vapormotoroj de la vagonarsistemo kiu kunligis Melburnon kun aliaj evoluantaj urbetoj, je tiu tempo malgraŭ manko de atento pri karbofumo.

La 20a jarcento estis la epoko de la aŭtomobilo kaj konstruado de ĉefaj vojoj, inkluzive de Princes



Flinders St stacidomo

Highway per kiu eblas veturi ĉirkaŭ la tuta lando. Multaj aliaj industrioj tiel evoluis por servi la pligrandiĝantan landon kaj por ebligi eksportadon. Tamen, por klientaro necesas pligrandigi la popolon en la lando mem. La indiĝenaj popoloj ankoraŭ ne agnoskatis de la regantaj britaj aŭstralianoj. Ekologie necesis post la dua mondmilito akcepti laboremajn homojn el multaj landoj, sed unue nur blankulojn. Estis la milito de Vjetnamio kaj la rifuĝintoj alvenantaj per boatoj kiuj en 1977 necesigis ŝanĝon de nacia politiko por akcepti ankaŭ malblankulojn. La loĝantaro de la tuta lando rapide kreskis al 20 milionoj kaj de Melburno al 3 milionoj. Ĉu estis la plej alta punkto de evoluado por konservi la rericervitan titolon 'Mirinda Melburno'? Evidente ne, ĉar vespere kutime la urbego malpleniĝis kaj allogis krimulojn. Plej multaj profesiuloj eskapis per vagonaro loĝantaj en la nun multaj tre diversaj sed proksimaj antaŭurboj. Necesis iamaniere reallogi pli da homoj en la urbegon per kreado de

novaj komunumoj kaj konstruigi altajn apartamentarojn tute apud kaj en la urbocentro mem, ĝis kreskis la loĝantaro al 4 milionoj, same kiel Sidnejo por la nova dudekunua jarcento.

Kvankam jam esplorado al la ĉielo komenciĝis – al la luno kaj al foraj planedoj, la nova jarcento alportis apartan atenton por la homaro al truo en la atmosfero, haŭtkancero, kaj la varmiĝo de Tero. Ĉi lasta fenomeno nun agnoskata de sciencistoj necesigas ŝparon de energio por eviti eligadon de grandaj kvantoj da CO₂. Kion fari en la plenŝtopita, betona urbego? Danke al bone konsilita antaŭenvidanta urba konsilantaro, raciaj planoj

aperas, sed ne sufiĉe rapide: bicikloj provizataj, malpermeso de aŭtoj en Swanston St, senpagaj tramvojaĝetoj en la urbocentro, manĝaĵvendejetoj en la teretaĝo de apartamentaroj, surtegmentaj ĝardenoj kaj abelujoj, kaj konstruaĵoj tute memsubteneblaj, sen uzo de tubakvo, sen karboenergio por lumo kaj klimatizado (sufiĉas unu planto po persono en konstruaĵo).

Per tia helpo de pluraj aktivaj ne-registaraj asocioj, inĝenieroj kaj industrioj de renovigeblaj energioj, ni esperu pri la konservado de niaj belega planedo kaj klimato por estontaj generacioj. ‘Mirinda Melburno’ ankaŭ havos la ŝancon pluvi.

Surtegmenta ĝardeno



**Yvan SERVE***Noumea, Nov-Kaledonio***Margaret CHALDECOTT***Sidnejo, Aŭstralio***Kion vi ŝatas pri via loĝloko?**

La tropikan klimaton, la bonhumoron de la loĝantaro, kaj la belecon de la insulo kaj lagono.

Kian laboron vi deziris havi kiam vi estis infano?

Tiun kiun mi sukcesis fari: oficiro en la mararmeo. Poste zorgi pri ŝipoj kaj ripari ilin.

Kio nuntempe estas plej grava en via vivo?

1. La feliĉo de miaj gefiloj kaj genepoj.
2. Mia sanstato.

Kio plej timigas vin en la nuna mondo?

La religia frenezo - la soleco de multaj homoj.

Kiel junulo, kiun vi admiris?

Nelson Mandela.

Kion vi ŝatas pri via loĝloko?

Sufiĉan manĝadon naturan sen tro da bruoj.

Kia estas la mondo kiun vi imagas?

Sen milito, kun interpopola fido kaj toleremo.

Kian laboron vi deziris havi kiam vi estis infano?


Dum la milito (1939-45) ne estis ebleco pensi pri laboro - oni simple laboris en taŭga loko.

Kio nuntempe estas la plej granda zorgo en via vivo?

Manko de fido inter naciaj estraroj.

En kiu lando vi ŝatus loĝi dum unu jaro se vi havus la ŝancon?

En Anglujo, Skotlando.



**TRILANDA KONGRESO
DE ESPERANTO KAJ
SOMERKURSARO**

BANDUNG, INDONEZIO

23-28 MARTO 2016



AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO
INDONEZIA ESPERANTO-ASOCIO
NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIO

Vizitu aea.esperanto.org por
pli da informo



Ĉu la vivo estus pli bona se oni ne devus manĝi?

ESPERANTO-RONDO DE WELLINGTON

Ni ĉiuj manĝas, kelkfoje ĉiutage kaj ĉiun tagon de nia vivo. Ni devas manĝi ĉar, se ne, ni mortos. Tamen, ni elspezas multan monon por manĝi, kaj kelkfoje multan tempon. Se ni tro manĝas aŭ male ne manĝas, okazas sanaj problemoj. Tial, ĉu estus pli bone se oni ne devus manĝi?

Eble jes. Estus multaj avantaĝoj. Sen devi manĝi, for dentoj! For problemoj pro malpuraj dentoj kaj for multekostaj vizitoj al dentkuracistoj. Ni ŝparus multan monon se ni ne devus aĉeti manĝaĵojn, telerojn, manĝtablojn ktp. Sen kuirejoj, niaj domoj estus pli malgrandaj kaj, tial, malpli kostaj. Ni havus pli da libera

tempo por verki artikolojn por ĉi tiu revuo aŭ por io ajn alia.

Fakte, manĝi povas esti danĝere. En Nov-Zelando kaj Aŭstralio ĝenerale ne mankas manĝaĵoj kaj, pro tio, ni ofte tro manĝas kaj dikiĝas. Povas okazi problemoj pro troa pezo. Simile, ne manĝi estas grava problemo. Temas pri anoreksio.

Tamen, manĝi estas evento por kunvenigi amikojn kaj familianojn. En landoj kiel en Latin-Ameriko, manĝi estas grava afero. Ĉiuj familianoj sidas dum horoj kaj ili babilas dum manĝo. Sen ĉiutaga kunsido por manĝo, ĉu familioj disrompiĝus? Manĝi ankaŭ donas



plezuron, ĉu ne? Imagu se vi perdiĝos en granda maro kaj oni trovos vin post multaj monatoj. Se oni demandas ‘kion vi deziras?’ ofte la perdinto petas specialan manĝaĵon. Simile, mortigoto en senliberulejo rajtas peti specialan manĝon por sia lasta vespermanĝo.

Tamen, se ni ne devus manĝi, la loĝantaro de nia planedo troiĝus. En multaj malriĉaj landoj, bedaŭrinde, infanoj mortas pro manko de manĝaĵoj. Sen tia problemo, infanoj ne mortus kaj ekus novaj problemoj pro manko de spaco por ni ĉiuj (sed, malgraŭ ĉi tiu inventita problemo, ni certe ne preferas nian nunan mondon kie mortas infanoj). Same pri bestoj. Ni mortigas bestojn por manĝi ilin. Se oni ne devus manĝi, estus miliardoj da ŝafoj, bovoj, porkoj, kokidoj ktp. Ĉu estus spaco por ili

sur nia planedo?

Pensu ankaŭ pri ekonomiaj aferoj. Estas milionoj da homoj – farmistoj, fiŝistoj, vendistoj, kelneroj, kuiristoj ktp – kies laboro dependas de nia ĉiutaga manĝado. Pensu eĉ pri televidaj programoj (Masterchef ktp), reklamoj, pakajoj, kaj gazetoj pri manĝaĵoj ktp.

Se ni pensas aldone pri trinki, miloj da trinkejoj devus fermiĝi. Kion farus niaj gejunuloj? Ili emas en semajnfino viziti trinkejon por ebriiĝi kaj por renkonti ontan edz(in)on aŭ kunul(in)on. Sen tiaj kunvenejoj, niaj gejunuloj restus sen amat(in)o kaj ... en la mondo ne plu estus infanoj!

Do, ne estas facila respondo al nia demando. Ĉu manĝi estas bone aŭ malbone? Ni sugestas ke vi pensu pri tiu demando dum via vespermanĝo. Bonan apetiton!

Esperanto – oficiala lingvo en Aŭstralio!

DAVID RYAN (WELLINGTON)

Ne multaj homoj scias ke Esperanto estas oficiala lingvo en Aŭstralio – ne de Aŭstralio, sed en Aŭstralio.

Hazarde mi trovis artikolon en Vikipedio pri la Princujo de la Rivero Hutt en okcidenta Aŭstralio, norde de Perto. Laŭ ĝia konstitucio estas tri oficialaj lingvoj: angla, franca, kaj Esperanto. La retpaĝo (www.principality-hutt-river.com) estas sufiĉe informriĉa kaj ĝisdata.

La Princujo oficiale secesiis de Okcidenta Aŭstralio la 21-an de aprilo 1970 kaj nun havas reĝon,

registaron, flagon, dolaron, armeon ktp – nekredeble ĉar la lando havas nur 23 enloĝantojn! Verŝajne miloj da turistoj vizitas tie ĉiujare.

Malfeliĉe mi ne trovis informon por klarigi kial Esperanto estas unu el la oficialaj lingvoj. Estas franclingva versio de la retpaĝo de la Princujo, sed ne Esperanta versio.

Nu, mi sugestas ke iu vizitu la Princujon por esplori pri la ebleco okazigi tie venontan kongreson en tiu lando kie Esperanto estas la oficiala lingvo.

Akvaj rajtoj

KAM LEE (HOBARTO)

Temas pri teatraĵo kiun mi verkis dum la kongreso en Kanbero en januaro 2014. Je la komenco de la kongreso mi renkontis Lumeron, kiu estas esperantistino el Koreo. Ŝi interesiĝis pri partopreni en teatraĵo se la temo plaĉas al ŝi. Ŝi menciis ke ŝi kandidatiĝis al posteno kiu temas pri ĝusta divido de akvaj rimedoj inter komunumoj.

Do, la teatraĵo temas pri Lumera, mondkonata pacnegocisto, kiu lastatempe gajnis Nobel-pacpremion. Ŝi estas dungita de Unuiĝintaj Nacioj por provi solvi internacian disputon. Grava rivero trapasas du apudajn landojn, kaj la prezidento de Baratlando deziras konstrui akvodigon kiu kaptas plejmulte de la akvo, kio minacas militon kun la alia nacio, Gileslando, pro ne ĝusta divido de la rivera akvo. Malsukcesa kunsido inter la du nacioj okazas kaj la pacnegocisto devas pripensi kiel savi la mondon kontraŭ detruiga milito.

Serĉante ideojn kaj manierojn por solvi la problemon, la pacnegocisto vagadas tra la urbaj stratoj kaj hazarde trovas Esperanto-Domon. Ŝi eniras la modernaspektan konstruaĵon kaj ŝi renkontas banĝiston, poetinon, kaj estraranon de Esperanto-TV.



Komenco de negocioj inter la du grandaj nacioj



Komenco de konsterno kaj ŝoko de la pacnegocisto. La Prezidento de Baratlando nepre konstruos digon sur la rivero.



Esprimante patriotismon kaj kuraĝon, la prezidento de Gileslando deklaras militon kontraŭ Baratlando. Rezulte, la pacnegocisto ŝokiĝas kaj estas tre deprimita. Tamen, ĉio ne estas perdita dum ĉi tiu pesimisma momento, ĉu?



Festa momento en Esperanto-Domo. Bob feliĉe ludas la banĝon. Maldekstre al dekstre: Bob Felby (banĝisto), Indu Thapalia (poetino), Kam Lee (estranaro de Esperanto-TV), kaj Lumera Nohill (pacnegocistino)

La banĝisto kaj poetino prezentas poemon kun banĝa akompano.

La pacnegocisto mencias la problemon al la Esperanto-grupo. La estrarano de Esperanto-TV informas ŝin pri esperantista sciencisto kiu laboris por diga kompanio, sed poste mistere malaperis. Estis

onidiro ke li trovis ateston kiu forte kontraŭas la konstruadon de la digo. Foto de la sciencisto estas trovita en la Esperanto-biblioteko kaj okazas publike anoncita serĉo de la sciencisto.

La grupo de esperantistoj promenas tra la urbaj stratoj kaj



Piedirante tra la arbaro kaj portante foton de la mistere malaperinta sciencisto, la grupo sukcese trovas la viron. La sciencisto havas gravan ateston kiu kontraŭas la konstruon de la digo.

ili ricevas publikan subtenon de la ĝenerala publiko. La serĉgrupo piediras ekster la antaŭurboj kaj en la kamparajn regionojn. Hazarde, Lumera stumblas sur ŝtupo kiu fakte estas dormanta homo. La afero estas interesa ĉar la homo fakte estas la malaperinta sciencisto kiu ĵus eskapis el sekreta karcero de la diga kompanio.

La esploroj de la sciencisto montris ke la konstruado de la akvabarilo kaŭzos plej probable grandajn tertremojn. Por eviti nuligon de la kontrakto kaj grandan perdon de mono, la diga kompanio kaŝis la ateston kaj enkarcerigis la scienciston.

La venontan tagon, okazis kunsido kun la pacnegocisto, sciencisto, kaj la estroj de Baratlando kaj Gileslando. La prezidento de Baratlando estis informita pri la problemoj de la konstruado de la digo kaj, pro tio, la projekto estas haltigita. La minaco de milito estas nuligita kaj la du nacioj estas amikoj.

Manpremo inter la du prezidentoj, halto de la konstruo de la digo, evito detertremego kaj daŭro de mondpaco



Tagiĝo plue brilos

CHARLES STEVENSON (ADELAJDO)

Kelkfoje neatendita saĝeco troviĝas en himnoj. George Matheson verkis “Ho Amo, kiu ne forlasas min” el frakasoplena malespero - la fianĉino trompis la edziĝonton. Ĝi tute ne povus alfronti la estontecon kun ekblindulo. Matheson verkis:

*Ĉielarkon tra pluvaĉo
Oni ĉasas sentaŭgece
Ĉar neniam ŝanĝiĝos la promeso
Ke tagiĝo plue brilos*

Ĉiuj el ni konas tiajn aferojn kiuj preskaŭ detruas nin, ĉu ne? Ĉefa estas la streĉa perdo, ĝis la koro, de edz(in)o. Ne nur per la memoro, sed per vojo neatendita, vivas la mortinto, sed en ŝanĝita formo, ekzemple per siaj skribaĵoj. Tamen, dolore estas kiam amikoj tute forgesas la malaperinton. Aliflanke povas esti ke iu memoro restas tiel sankta ke parolado nur profanigus.

Ĉiuokaze nuntempe la domo, antaŭe ĝojplena kun viveca familio, malplenas. Oni deziras dividi travivaĵojn de la tago, novaĵojn, montri foton – sed al kiu? La alia flanko de la manĝotablo estas vaka, neokupita. Vualo de silento absoluta anstataŭas konsolindan interparoladon.

Laŭ onidiroj tempo estas la granda resanigilo. Aliaj diras ke neniam la perdo forŝteliĝos. Sed ne gravas kio ajn, la vivo ne ĉesas. “La reĝo mortis: longe vivu la reĝo” iame estis dirita pri la antaŭulo kaj la posteulo.

La vivo evoluadas – nenecesa diraĵo, eble; sed de tempo al tempo forte evoluenda estas iu okazo, iu travivaĵeto, iu kunkuneco kaj ja, tute nova, neatendita vivo ekkaptas nin!

Morto estas akra fermo. Sed daŭre tra la jaroj venas malpligrandaj, sed efektivaj malfermoj: la lernejo, la universitato, dungo, vivo sola, elhejmiĝo, transloĝiĝo, perdo de bona amiko, kiu migras transmaren, interurben ktp...

Mi agnoskas la saĝecon en la parabolo de la kristana Biblio pri la nova vino: malnovaj boteloj frakasiĝus se oni verŝus en ilin novan vinon. Ankoraŭ je nova ekkomenco post grava vivfortranĉiĝo ni estas kvazaŭ la vino, sed ni estas nova vino. Alivorte, la fundamentoj de nia edukado, niaj moraloj, niaj kredoj, niaj valoroj, ne estas ŝanĝitaj, nur la ‘novaj boteloj’ de la neatendaĵo. Ĉi tiu rekomenco refortigas la koron per nova ĝojo kaj aktiveco. Novaj vidpovoj defias nin. Nova amikeco, esplorado de novaj ĉirkaŭaĵoj, kaj nova ideo, kiu ekfrapas la menson, ĉiam korvibrigas la animon.

Nun, kun Matheson ni povas komfortige kanti:

*... neniam ŝanĝiĝos la promeso
Ke tagiĝo plue brilos.*



New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

Bradley McDonald | President

Ivan Pivac | Vice-President

David Ryan | Treasurer

Committee Members:

Erin McGifford, Chris Krageloh, Rouan
van Ryn, David Dewar

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.



Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | President

Jonathan Cooper | Vice-President

Heather Heldzingen | Treasurer

Esther Parris | Secretary

Committee Members:

Margaret Chaldecott, Joanne Johns,
Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



100^a Universala Kongreso de Esperanto

Lillo (Lille), Francio

25 julio – 1 aŭgusto 2015

Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj

De la unua... ek al la centa!



esperanto
France

www.lille2015.fr

